



Eldonas : Cercle espérantiste de l'Agenais * Abono por 1 jaro
F 47340 LARQUE TIMBAUT *** 18FF (Francio:14F)
Poŝtkonto : 3 371 74 M Bordeaux ** al la ĉi-apuda pĉ



Meĥanika muziko

Ĉe multaj estas en bela tono
Eble kun ia risko.
Ŝanĝi nadlon aŭ diskon
Ĉe familia gramofono.

Kverelo

Jen la vivkutimo
Inter edzo kaj edzino.

Vira vivo

Brando, konjako, vino
Kaj intertempe :
Tago de l'Virinoj !

Laŭda mencio

Jen la vero
Kara Samideano
Post via kurso
multas ekskursanoj.

La plej malforta punkto

De la movado aĥila kalkano.
Jen kvereloj inter samideanoj.

Malforti okulojn

Nur tia viro vere estas blinda
Kiu ne vidas knabinon pekinda.

El la vojaĝo

Ĉie man' mia vagis.
Ŝi tute ne reagis ?!

La konataj sonoj

En ĉi-mond' mute-surda
aŭdeblas nur voĉ' murda.

Fanfaronulo

Per persisto kaj la peno
Li atingis amhavenon !
Sed, kiam ŝi lin spronis
li ĉesis fanfaroni.

Maloftaj oftajoj

Ne ĉiu knabino
Tuj estas fe-ino
Kaj ne ĉies krurojn
Finas la fe-muroj.

Post oratora konkurso

Pro la parolad' plenpena
Vi ne ricevos pokalon
"Lapenna".



A. Madej

LA VOJO ANTAŬEN

de L. MEE

Mi estas obsedata per penso, ke, se iam Esperanto atingos akcepton pere de la amasoj, ĝi tiam tian akcepton akiros ĉar, kaj nure ĉar, homoj grandamase konstatos, ke per la internacia lingvo ili povas ĝui materian "profiton", kiun ili ne povas ĝui per iu alia rimedo. (Ni pensu nur pri la disvastigo de la angla lingvo, por konstati, kion povas fari la profitmotivo.)

Ne necesas diskuti la fakton, ke ni Esperantistoj ĝuas spiritan "profiton" per kaj pro nia subteno de la i.l., nek ke ni ĉiuj forte deziras dividi tiun spiritan profiton inter ĉiuj homoj en la mondo. Sed tutevidente tiu spirita profito ne sufiĉas ; 99,8 procento de la homaro ne parolas Esperanton, malgraŭ la naŭdek jaroj dum kiuj ĝi jam ekzistas.

Ĉiu leganto de tiuj ĉi vortoj bone scias, ke Esperanto, kvankam ne estante absolute perfekta lingvo se ni aplikas al ĝi la rigorajn kontrolojn de lingvistikoj, tamen estas perfekta komunikilo inter homoj, ĉu ili interkomunikadas parole, skribe, morse aŭ per iu alia metodo. Esperanto estas bonega lingvo, tute taŭga por literaturo, ĉu proza ĉu poezia, por scienca esplorado kaj por disvastigi de sciencaj malkovroj, por interŝtataj traktadoj kaj por politikaj celoj ĝenerale, por kantado kaj ĉiuj aliaj formoj de distraĵo, por edukado de infanoj kaj plenaĝuloj, ĉu ĝenerala ĉu faka, por interŝanĝo de opinioj pri filozofio, religio, arto kaj interhomaj rilatoj ĝenerale, kaj por komerco en ĉiuj ĝiaj multegaj formoj.

El tiu longa listo, la nura rubriko pri kiu ni devas konstati, ke Esperanto ne estas uzata, (aŭ estas tre, tre malofte uzata), estas la lasta, en komercaj rilatoj. Strange, ĉu ne, ke la plej rikoltopotenca kampo estas precize tiu, kiun ni ne plugas !

Tradicie, verŝajne, la vorto "profito" estas tabua vorto inter Esperantistoj. Dum la jaroj, pluraj generacioj de Esperantistoj sindone oferadas laboron, ofte sufiĉe streĉan

laboron, tempon, ofte sufiĉe longdaŭran tempon, kaj monon, ofte sufiĉe pene akiritan monon, al la disvastigo de nia kara ideo, ke homoj povu interkompreniĝi senĝene trans la barilo de malsimilaj ĉiutagaj lingvoj, kaj per tiu facila interkomprenado akceli la alvenon de paco kun samtempa egaligo de vivriĉeco en ĉiu angulo de nia, mirinde riĉa, mondo.

Ĉu mi estas tro severa, se mi asertas, ke tiu sindonado estis kaj estas farata kondiĉe, ke, per Esperanto, neniu persono spertu materian profiton? La nura alia ebla konkludo estas, ke Esperantisto estas aparta speco de homo, apartigita disde la grandega plimulto de la aliaj membroj de la homaro per nekapablo kompreni la plej simplan regulon de ekonomiko, ke laboro, (en la plej vasta senco de la vorto), devas esti rekompencata per akiro de la rezultato de (almenaŭ parto de) la laboro de alia homo aŭ aliaj homoj. Tiun konkludon mi ne trovas konvinka.

Tute povas esti, tamen, ke Esperantistoj ĝenerale simple forgesas apliki al siaj laboroj por la i.l. la ĉiutagajn spertojn akiritajn per pangajna laboro por entrepreno aŭ instanco. Ĉu inter miaj legantoj estas iu persono, kiu ne al kutimiĝis jam al enspezo kaj elspezo de mono, al konservado de parto de la enspezo en iu tempo por ebligi ĝuadon de varo aŭ servo en alia tempo, al daŭra pliefikigo de la rezultoj de homa laboro per sciencaj kaj teknikaj malkovroj fare de esploristoj en kampoj en kiuj komerco sekvas la kutimajn vojojn; mallonge, al la grava rolo de profito?

Bedaŭrinda rezulto de tiu forgesemo de Esperantistoj estas, ke, tro ofte, la atingiĝoj de tiuj sindonaj ofertoj malaperas sen spure, foje post mallonga tempo. Neniu povas nun kalkuli la nombron de lokaj E-societoj, kiuj siatempe floris sed poste malaperis, aŭ de revuetoj, kiuj siatempe promesis gravan estontecon sed efektive vivis nur mallonge, aŭ de la gravaj libroj, precipe fakvortaroj, kiuj aperis en nur la unua eldono, neniam reviziita nek korektita. En la plimulto de tiuj kazoj, la tempo-daŭro de la societo aŭ revueto estas ligita al la vivo de unu persono, kaj la malapero koincidis aŭ kun la morto de tiu persono aŭ kun la eluzo de la fordonebla kvanto de la

mono de tiu persono. Se ni aplikas al ĉiuj tiuj kazoj la normojn de ekonomiko, ni ne povas eviti la konkludon, ke la koncernata agado estis farata en maniero kiu ne certigis la kreon de la profito necesa por certigi la daŭrigon de la entrepreno.

Sendube, en kelkaj, eble multaj, kazoj, la intenco de la iniciatinto vere estis, ke la entrepreno neniel spertu profiton; en aliaj kazoj, la iniciatinto eble ne havis apartan sintenon, ĉu pro ĉu kontraŭ profito, sed simple neniel pensis pri ĝi, ne sufiĉe lerte faris la bazajn kalkulojn kaj baldaŭ trovis, ke daŭrigo de la entrepreno kostas ne-elteneblan elverŝon de propra mono.

Estas fakto preter dubo, tamen, ke la plenumo de iu ajn tasko kaŭzas elspezon, en la plej simpla kazo elspezon de laboro, en aliaj kazoj de mono per kiu akiri la rezultato (j)n de la laboro de alia homo aŭ aliaj homoj.

Se iu tasko estas ade ripetita, tiu poa elspezo devas esti kovrita per enspezo, en la plej simpla kazo per kontentiĝo pro la rezulto de la laboro, en aliaj kazoj per mono aŭ valorajo en iu formo. Pli grave, en la kazoj kiam plenumo de la tasko postulas la uzadon de ekipaĵo en iu formo, la kvanto per kiu la enspezo "kovras" la elspezon devas esti sufiĉe granda por ke, post pli-malpli longa tempo-daŭro, sufiĉe da mono estas konservata por ebligi renovigon de la ekipaĵo. Enspezo de tiu "plusa" kvanto de mono ne estas ago preni profiton el la entrepreno; la kosto de eluzado de la ekipaĵo estas ordinara parto de la kosto plenumi la taskon. La iompostioma konservado de tiuj "plusoj" estas nepre prudenta ago por malebligi la ĉesigon de la entrepreno en la tago kiam la ekipaĵo ĉesas funkcii, aŭ ne plu povas plenumi la taskon.

Por ebligi al la entrepreno vere flori necesas, ne nur, ke la "kosto" estas kovritaj per la enspezoj (laŭ la ĵusa klarigo), sed ankaŭ, ke la "plusa" kvanto de mono sufiĉas por ebligi akiron de plua aŭ plukapabla ekipaĵo. En tia kazo, ne eblas ne rekoni tiun "pluson" kiel profiton.

Ni revenas, do, al nia komencpunkto. Ni ĉiuj deziras, ke Esperanto atingu akcepton flanke de la mondo ĝenerale;

necesa baza kondiĉo estas, ke Esperanto-societoj, -instancoj kaj -entreprenoj floru vaste tra la mondo ; ligita kondiĉo estas, ke nunaj kaj estontaj Esperantistoj subtenu tiujn entreprenojn kiuj kaj uzas la internacian lingvon kaj faras profiton. Ne-evitebla konkludo estas, ke la sinteno de la plimulto de ni, ke la vorto "profito" estas tabua vorto, estas erara sinteno. La ebleco konstati komercan gajnon ligitan kun la uzado de la i.l. estas nepre antaŭkondiĉo por iu serioza provo akceptigi Esperanton ĝenerale en la mondo.

Eĉ se ni volas pensi, ke per akiro de kapablo en la internacia lingvo, ordinara homo tiel ŝanĝus sian sintenon, ke ŝili libervole forlasus la uzon de la angla lingvo, (per kiu ŝili ne-eviteble rekonas gradan plialtiĝon en la propra vivnivelo, kaŭzitan per la saĝa apliko de la profito normale ligita kun komerca interŝanĝo de varo aŭ varoj), kaj komencas fidi je la efikeco de neŭtrala interkomprenigilo en kampo en kiu ĝi ĝis nun neniel havis ŝancon pruvi tiun efikecon, ni devas agnoski, ke tiu volo estas nenio alia ol revo, por ne diri memtrompo.

Kaj la afero nun urĝas. Ĉiutage ni legas pri nova kresko de internaciaj komercaj rilatoj ; racie ni devas agnoski, ke la disvastigo de la usona dialekto de la angla lingvo ĉiutage akiras pli kaj pli da forto, dum la disvastigo de la vera internacia lingvo stagnas. Estas jam malfacile resti optimisma, ke Esperanto gajnos en la konkurso ; se nia lingvo malvenkos en la komercaj rilatoj, restas malgranda ŝanco akceptigi ĝin en aliaj medioj.

Ĝis maksimume, niaj fortoj devas kunligiĝi nun en streboj plivastigi la uzon de Esperanto en komercaj rilatoj. Taŭga komenca punkto -ĉar ni devas pensi pri agado kiu daŭros pli ol nur kelkajn tagnoktojn - estas en la kontentado en lokaj societoj tiel, ke ĉiu membro baldaŭ kutimiĝos al la uzo de la fakaj, sed tamen ordinara, vortoj necesaj en komercaj rilatoj. Sed alkiutimiĝo al la "komercaj" vortoj ne sufiĉas ; Esperantistoj devas agnoski, ke en ĉiu ago fari aĉeton, ĉu de vivnecesaĵo, de alia varo aŭ de servo farota de alia persono, la aĉetanto donas al la liveranto iom da profito. Ni devas konscie serĉi metodojn doni tiun profiton al persono aŭ instanco kiu uzas la

internacian lingvon ; per ĉiu tia profito ni plifortigos nian propran intereson.

//

Pri la aŭtoro. Lawrence Mee estas brito, (anglo), kiu dum pluraj jaroj loĝadas en Rotterdame, Nederlando. Tie, kune kun sia edzino, li gajnas vivrimedojn per instruado de la angla lingvo en privata lingvo-lernejo. S-ro Mee speciale instruas la anglan por uzado en komercaj rilatoj. En Esperantujo, li estas konata kiel la kunposedanto de la entrepreno, Mondkomerca Eldonejo Esperantista, kiu uzas nur la internacian lingvon, kaj kiel la ĉefa favoranto de la uzo de la Stelo kiel kalkul- kaj mon-unuo.

//

LM

Rotterdam,

1981-04-12

Glosaro:

ŝili = ŝi aŭ li (Eichholz, Esperanto-Presejo, Kanado, 1978).

Tutmonda Literaturo

pliriĉiĝu per diversgrunda kontribuado.

Unu el la naturaj misioj de nia monda lingvo estas diskonigi tra la mondo la apartajn trezorojn de la popolaj literaturoj.

Jam ekzistas en esperanto pluraj naciaj antologioj, inkluzive kataluna. Mankas ankoraŭ franca, kiu estus grandioza monumento. Ne mankas en franclingvio talentplenaj samideanoj kapablaj ĝin efektiviigi.

Mi pensas pri iom pli modesta celo : nome provenca-okcitananta antologio, el verkoj de mezepokaj trobadoroj ĝis modernaj felibroj, ne forgesante anonimajn popolkantojn. Vasta, ampleksa tasko ! Mi ne estus sufiĉe kompetenta, kaj mi estas tro maljuna por entrepreni ĝin. Mi nur volas atentigi pli junajn kaj pli kapablajn, ke ili pripensu tiun ambician projekton.

Mi laŭtigas tiun vokon per "Laŭte", ĉar nia revuo, kiu celas tutmondan disvastiĝon, estas ĝis nun enradikigita precipe en Okcitanio : do en tiu grundo ni semu la ideon. Kun la espero, ke ĝi ĝermos, kreskos kaj iam floros.

Valo.

Maljunulo rakontas : PRO KIO MI ESTAS

 ĈIAM "SENMONA"

Dum mia vivo mi trapasis bonajn kaj malbonajn situaciojn, kun iliaj agrablaj kaj malagrablaj niveloj de salajroj.

Kiam mi laboris por tre malalta salajro, en fabriko aŭ ĉe metiisto, mi min duŝis unu fojon semajne en urba banejo.

Ĉi tie mi lavis en tiu okazo miajn tolaĵojn, ŝtrumpetojn ktp. Mi poste ankaŭ kudris miajn butonojn kaj truojn de butonoj hejme, flikis ĉion, kio estis flikenda.

Kiam mi estis pli bone salajrata, mi portis miajn tolaĵojn al la grandlavejo... kaj miajn flikaĵojn faris iu domgardistino.

En tre bona situacio mi aĉetis aŭtomobilon, pagis en ĉiu okazo kaj al ĉiu...

Neniam venis al mi la ideo elspezi nur la duonon de mia salajro, ĝis, iun tagon, mi renkontis fraŭlinon, kiu al mi proponis, ke ni loĝu ambaŭ per duono de elspezo por ĉiu, faru manĝaĵojn sur la komuna fajro, ktp...

Mi, kiel homo de esplorado, akceptis ĉi tiun proponon por vidi la rezulton... des pli, ke ŝi laboris ie kun malgranda salajro kiel mi.

De tiu momento mi ŝanĝis mian vivsistemon.

Mi komencis elspezi nur la duonon de mia salajro... Mia fraŭlino faris same. Ni laboris pli ol antaŭe. Ni ŝparis pli ol antaŭe, ni amikiĝis pli ol antaŭe kaj iun tagon ni geedziĝis, por la plej bona kaj malbona estonteco...

Venis milito. Malebleco repreni pene ŝparitan monon el banko por aĉeti ion, ĉar ĉiuj prezoj ege plialtiĝis... kaj post la milito ĉio estis perdita...

La "malamikaj" soldatoj (por ne diri "ŝtelistoj") forportis ĉion forporteblan, nia registaro ŝtelis per sistemo de "inflacio" nian pene ŝparitan monon, kaj ni ĉiam restis SEN MONO...

-nn-

LAŬT EKOLOGIO

"ENERGIO"

Popolo, kiu kritikis sian registaron pri ties sinteno rilate atomenergion. Registaro, kiu tiam estigas "largŝkalan socian diskutadon". Parlamento, kiu prokrastas sian decidon pri plua konstruado de nukleaj centraloj, ĝis verdiktos pri tio la popolo. Jen tre malversajna, fantazie elpensita scenaro, ĉu ne ? Fikciaĵo !

Kaj tamen tio reale okazas. Nun. En Nederlando. Kaj en tiu scenaro ĉefrolas tuta popolo, kiu taksas siajn fortojn, difinas siajn bezonojn, elektas sian estonton. Sub tiaj kondiĉoj ĉu mirige, ke ankaŭ nederlandaj esperantistoj sentis sin koncernataj, ke ili elektis tiun temon por debati dum la Nederlanda Esperanto-kongreso, ke ili eldonis la rezulton de sia pripensado kiel kontribuon al la ĉiesa strebado ? Tial kaj tiel naskiĝis "Energio", eldonita de Federacio de Esperanto-organizoj en Nederlando (FEN), aprilo 1981, kompilita de I: de Bruin-Kooij kaj A.J.F. de Wit (prezo ne menciita).

Pri tiu broŝuro mi dirus, se la temo ne estus tiel grava, ke ĝi altgrade posedas la malfacile kunigeblajn ecojn, kiujn postulas la virinoj de virinaj ŝuoj : malgrandan eksteron kaj grandan kapaciton. Ĉar en apenaŭ pli ol sesdeko da paĝoj estas pritraktitaj ĉiuj ĉefaj flankoj de problemo, kiu influas pli kaj pli la ĉiutagan vivon, interesas ĉiun apartan individuon kaj vole nevole koncernas la tutan homaron, nunan kaj estontan.

Ke la energitrezoro de krudmaterialo estas elĉerpebla, ke ne eterne povos la potencaj ŝtatoj prirabi la malfortajn, ke la miraklo de atomenergio eble estas ne tiel mirakla, kiel oni iam kredis, ke daŭraj energifontoj "alternativaj" ja ekzistas, estas ideoj jam sufiĉe large disvastiĝintaj en la publika opinio. Sed multe pli antaŭen iras la aŭtoroj, kiuj kondukas la la leganton, paŝon post paŝo, al sobra, dokumentita, senpasia rigardo super la timige kompleksa problemo de la energio. Bezonoj kaj prognozoj, fosiliaj brulaĵoj, atomenergio, alternativaj energifontoj estas laŭvice prilumitaj per klara komento ; avantaĝoj kaj danĝeroj estas pesitaj plej ekzakte. Kelkaj partoj de la verko koncernas nur Nederlandon sed energio estas mondskala problemo, kies premisoj kaj konkludoj nepre valoras por ĉiu lando, kie ajn ĝi troviĝas sur la tergloba. Tial

profitos el la legado ĉiu homo, kiu konscias pri la graveco de la afero, kiu sentas sin responsa pri ties evoluo, kiu ne intencas struti dum aliaj decidas. Tiom pli ke ne svarmas tiaj verkoj en la Esperanta literaturo. La Juna Penso eldonis "Atomcentraloj" en 1974, Monato aperigis du-tri artikolojn. Jen ĉio pri la temo !

Ni estu des pli dankaj al la aŭtoroj, kiuj kuraĝe eniris kampon preskaŭ ankoraŭ ne plugitan. De verko pri-traktanta tiel seriozan temon, oni povus timi, ke ĝi estos malfacile legebla, nedigestebla, eĉ iel oscediga. Ĉe la unua ekrigardo kaj foliumo vin surprizos la plaĉa tipografio, la aerumita enpaĝigo kun atentigaj flankstrekoj, grafikaĵoj, diagramoj, tabeloj kaj trafe elektitaj bildoj aŭ fotoj, kiuj tiklas la atenton, faciligas la komprenon kaj igas la legadon vera ĝuo.

Ni aparte danku al la (aŭtoroj) kompilintoj - kiel ili mem sin nomas modestece - kiuj ofte devis krei lingvan materialon por daŭrigi sian vojon tra la temo, kaj ĉiam sukcesis vesti la konceptojn plej adekvate*, kiel decas sur kampo, kie proksimumeco aŭ miso ne allaseblas.

La konkludon mi pruntos al la aŭtoroj mem, kiuj instigas al legado de ilia verko, ĉar skribas ili : "via energio (unua difino en PIV) tiel elspezita, certe ne estos malŝparita".

P. Signoret.

* Mi devas konfesi, ke mi tamen ne povis identigi la "fantombildojn de kameloj sur la tapeto". Tiu aludo fontas verŝajne el kulturo al mi fremda. Kutime mi vidas el mia propra tapeto nur rozkolorajn musetojn.

Bilanco de la poresperanta informlaboro en LARZAKO :

Deko da e-istoj (nur el Francio) ĉeestis. (ĉu sukceso por la esperantistaro ?). Ĉiutage oni starigis E-budon. Rimarkinda estas la interesiĝo de multaj gejunuloj pri Esp. Pli kaj pli Esperanto havas lokon en tiaj renkontiĝoj kaj meritas pli da "oficialaj" intervenoj fare de Esperantistoj. Eblas mendi la dosieron eldonitan post la fino de la Larzak-renkontiĝoj al : Paysans du Larzac, F 12100 MILLAU aŭ al: Rencontres internationales pour la Paix", 14 r. de Nanteuil F 75015 PARIS.
Ginette kaj Nicole.

Respondo al Kdo VITO kaj alvoko al ekologiistoj.

Strangaj estas la vortoj de Kdo VITO : "Mi timas, ke la griza polveca papero kara al L.A., ktp..."

Ne, Kdo VITO, ne estas pli kara al mi ol al vi mem antaŭ ol vi konvinkigis pri la malo, se mi bone legis vin. Nu, diferenco estas, ke vi ne ankaŭ konvinkis min.

Vi skribis, ke reuzita papero estas pli kosta ol la ordinara. Jen aserto, kiun vi devus pruvi... sed ne ĝoju tro rapide : laŭ ekologia vidpunkto (aŭ laŭ mi) la ordinara kalkulmaniero kara ĉefe al kapitalistoj, produktivistoj kaj aliaj "matematikistoj" estas falsa, ĉar ĝi ne enkalkulas konsekvencojn (ĉu bonajn, ĉu malbonajn), kiuj ne estas tradukeblaj je ciferoj. Ankaŭ eĉ la ciferoj estas artefaritaj. Ekzemple : Pri la kosto de papero oni povas akordi pri kosto de laborsalajroj, sed kiom kostas la arbo, laŭ la dezirata monprofito, la zorgo (aŭ malzorgo) pri estonteco ktp ?

Ankaŭ la sano de poŝtistoj kaj aliaj "viktimoj" de "polveca papero" devas esti enkalkulita.

... Mi ne havas tempon por fari liston de varoj produktitaj tra malsankondiĉaj laboroj, sed ĉu vi estas preta rezigni pri uzo de tiuj varoj ? Multaj agoj, kiuj estas ordinare sendangeraj, fariĝas dangeŝaj en la produktivismaj laborkondiĉoj. Ĉu ne pli urĝas ŝanĝi tiujn laborkondiĉoj ? Eble kontraŭ la polvo de papero sufiĉus pli malrapida laboro, paŭzoj, pli mallongdaŭra taglaboro ktp.

Alia demando : Ĉu ni ne devus batali kontraŭ malŝparo de papero ĉefe per reklamoj ?

Estas grave, ke ne nur la reklamoj estas kaŭzo de malŝparago de papero, sed ili falsas la regulojn pri informado en la gazetoj... La gazetoj, kiuj ricevas multe da mono pro la presado de reklamoj kaj tial uzas multe pli da papero, estas ĝenerale pli belaj, pli allogaj, pli malmultekostaj, kaj donas ĝenerale falsajn informojn... Alie, por esti liberaj, informi vere je servo de malriĉuloj kaj laboristoj, aliaj gazetoj devas rifuzi la reklamojn, do la monon venantan de tiu flanko. Pro manko de mono ili malfacile povas plenumi la deziratan taskon, ofte devas rezigni.

Ĉu ne estas sufiĉa kialo por batali kontraŭ reklamoj kaj malŝparo de papero ?

Lucien Angevin.

Responde al L.A.

Ja mi ne ĝuste respondas la demandon de L.A. (Laŭte n-ro 35). Tamen mi konigos informojn pri la reuzata papero, kiujn verŝajne multaj legantoj jam ekkonis per ekstrakto el la franca gazeto "La Gueule Ouverte" :

"En Nancio, en 1979a, situis fabriko, kiu transformis 46 000 tunojn da reuzotaj paperoj kaj kartonoj. La paperfabrikado eligas neeviteblan malagrablan odoron. Al tiu ĉi nocivo aldoniĝas la polucio de grandaj kvantoj da akvo, kiu postulas investojn por konstrui purigejon.

La transformado de la jam uzitaj paperoj en kartonon kaj ĵurnalpaperon estas multe malpli poluciiga. Oni povus transformi la ĵurnalpaperon en ĵurnalpaperon kondiĉe ke ĝi estu presita per seninkiga procedo. Oni importas pli ol la duonon de la necesa kvanto. En la jaro 1978 la du trionoj de la kartono kaj malpli ol kvin procentoj de la skribpapero kaj pres-papero fabrikita en Francio devenis de fibroj el reuzita papero.

Por fabriki unu tunon da ligna paperpastro la francaj fabrikistoj uzas 0,48 tunon ekvivalentan petrolon, tio estas preskaŭ 3 % de la energio konsumata por industriaĵ celoj.

La paperfabrikado apartenas al la 10 plej energi-uzantaj industriaĵ fakoj samtempe laŭ krudaj ciferoj kaj laŭ procento de la pezo de l'produkto. La fabrikado de la reuzata kartono postulas nur sesoble malpli da energio ol la fabrikado de sama kartono eltirita el ligno.

Oni opinias, ke, reuzante pli da jam uzitaj paperoj kaj uzante por la paperfabrikado samajn procedojn kiel en najbaraj landoj (Aŭstrio, ekzemple), la konsumado de energio por ĉiu produktita tuno malpliigus je 60 %. (*)

Ĝis nun la ŝtato ŝajne ne interesiĝis pri tiuj ŝparoj. La ŝtato subvenciis po 47 milionojn da frankoj kaj alpruntis 400 milionojn je tre malalta interezo al "Rochette-CENPA" por plivastigi en Tarascon ĝian uzinon, kiu ne reuzas la uzitajn paperojn, sed fabrikas paperpaston el ligno. Tio devigos la uzinon plivastigi sian provizan kampon, do pligrandigi la energi-konsumadon pro la transporto de la ligno.

(*) Absoluta participo insidas en tiu frazo. Kiel aĉa besto!
(red)

Tiel, la ŝtato favoras la vastigon de la multa konsumantaj uzinoj kaj la malaperon de la malgrandaj. Niaj energi-bezonoj plimultiĝos. Tio pravigos la nuklean programon, ne ĉar ĝi produktos energion, sed ĉar ĝi celas ĉefe la eksportadon, kies profitantoj estos la multnaciaj trustoj.

En nia komerca ekvilibro la ligno-fako situas ĉe la dua vico en nia eksterlanda komerco, post la petrolo, la plej deficitata. Paperpastro, meblo-importado kostas al ni tiom, kiom du monatoj da petrol-importado. Ŝajnus saĝa afero klopodi por forigi tian deficiton. Ebligus tion la "Heksagona" arbaro kaj garantiata, efika posta industrio.

Fakte, en multaj lokoj la privata arbaro estas tro ekspluatata pro spekulaciaj celoj, sed sume la arbaro estas ne sufiĉe mastrumata kaj subekspluatata. La ĉiujara arb-kresko estas proksimume 50 milionoj da kubaj metroj, dum oni ekspluatas nur 32 milionojn... Restus eĉ pliaĵo por produkti energion..."

En Rouen, se mi ne eraras, paperfabriko poluciadas la aeron tiom, ke la loĝantoj atentis pri la vento-direkto por fermi aŭ malfermi siajn fenestrojn.

En la sama artikolo mi legis, ke la laboristoj kolapsas ĉe la kuvoj, kaj suferas pro nocivaj ĥemiaĵoj, kies ĝustajn faktojn kaj nomojn mi ne plu memoras. Tamen ili eltenas ilin, ĉar oni laboru por akiri vivrimedojn... Malbonŝancaj homoj... Kiam oni scias, ke iuj ricevas kiel maldungan monon pli ol 106 milionojn... por laboro, kiu estas inter la plej agrablaj kaj ĉefe ne danĝera...

Trad.kompil. Suzana.

Intervjuisto al industriisto :

- Ĉu ni devas konstrui pliajn atomcentralojn ?
- Jes ja, por havi enormajn kvantojn da necesega energio, tio nepras.
- Ĉu ni bezonas multe da energio ?
- Energio ! Jes ja, jes ja !

La intervjuisto :

- Sed kion ni faros per tiuj egaj kvantoj da energio ?
- Ni konstruos atomcentralojn !!

Laŭ svedlingva prospekto sendita de VITO.

 * K R I A S M I S U R L A K A M P O *
 * de Sibuya Teisuke. *

En 1929, Sibuya Teisuke lernis esperanton en Somera Fremdlingva Universitato en Tokio, kies gvidanto kaj instruisto estis Itô Saburô (pseŭdonimo IU) konata per la poemaro "Verda Parnaso".

Komence Sibuya kaj Itô eldonis monatan gazeton "Kampara batalo" por revolucie unuigi la tiaman kamparanan movadon en Japanio.

"Krias mi sur la kampo" estis eldonita trifoje en 1926, 1964 kaj 1977. Sibuya estis 17-19jara, kiam li komencis verki ; li estis poeto kaj pensulo. Lia tuta verkaro naskiĝis el lia reala vivo kaj laboro, kiuj spegulas la situacion en la japana kamparo en la 20aj jaroj, kiam la kamparanoj tre suferis de la ekspluatado de la bienuloj.

"Nun la japanaj kamparanoj vole nevole uzas tre multe da kontraŭinsektaj pulvoroj, kemiajn sterkojn, kiuj difektas ilian sanon. Ŝuldoj pro aĉetado de terkulturaj iloj kaj maŝinoj pere de agrikultura kooperativo aŭ organoj kontrolataj de la registaro pelas ilin en financajn malfacilojn. La kampoj estas nun saturitaj per kontraŭinsektaj pulvoroj tiel, ke mikroboj de la tero formortas, kaj multaj el la kampoj ne plu povas reprodukti kiel antaŭe."

..."Sed, kompreneble, en Japanio ne ekzistas nur malesperigaj fenomenoj. Vidu kiel ekzemplon urbon Huzimi (ne tre malproksime de Tokio), en kiu tiu ĉi poemaro naskiĝis... (Tie) junaj kamparanoj konsciis pri la graveco de la aferstato kaj kulturaj... laŭ natura metodo, sen kontraŭinsektaj pulvoroj kaj kemiaj sterkoj. Ili rekte kontaktas aliajn urbanojn, kiuj konsumas agrikulturajn produktaĵojn sen perado de la organoj kontrolataj de la registaro. Lanĉiĝas tia nova movado ne nur en la urbo Huzimi sed ankaŭ en aliaj lokoj de Japanio."

Ankoraŭ nun Sibuya firme daŭrigas sian laboron kaj havas grandan esperon por la kampara movado.

Laŭ leteroj de Miyazaki Kimiko kaj de Kinugasa Hiroshi
 4-6-24-503 Nisirokugoo
 Oota-ku, Tokio, Japanio.

ADMIRANTOJ DE LA KAMPARA VIVO

Sibuya Teisuke.

Matena ĉielo de maja bela vetero
 Sereniĝas klare, agrable.

La hordeoj de la altebenaĵo etendiĝantaj
 ĝis la lasta horizonto
 tute nun egale spikiĝis.

En la matena suno brilanta
 plenmalseke je multego da roso,
 la ondoj senlimaj faras freŝa la marsupraĵon
 kun trembrilo.

! Mi sola venis plugi la kampon
 ! semi sojfabojn inter la sulkoj antaŭ la rikolto
 Vidante tian pejzaĝon mirindan,
 mi sentas min kiel feliĉa dio.

Sed
 tute subite !
 Ekpikas al mi la malplena stomako
 per kudrilo de mia apetito.
 Kiom ajn multe mi laboras kaj laboras,
 ni ne povas stabiligi nian vivon, eĉ manĝadon.
 Kiam mi konscias ĉi tion,
 mi ne povas ne tuj ekkuraĝiĝi kiel demono !

Admirantoj de la kampara vivo,
 Admirantoj de la natura belo,
 Kiela estas la kampara vivo aŭ la natura belo ?
 Ĉu vi scias, kiel mizera estas la vivo de ni
 farmistoj ?
 Kvankam de nokto ĝis nokto labori ni daŭrigas,
 sed pri nia manĝado ni maltrankviliĝas.
 Nenian rilaton ni havas al la kampara belo.

Admirantoj de la kampara vivo kun blankaj manoj,
 kiuj sidigas ĉe la fenestro
 de la trajno iranta malproksime,
 karan cigaredon fumante,
 kun bela kromedzino parolante :
 - Tio ĉi estas la natura belo, mia kara.

Ĝi estas ĝuste kvazaŭ vivanta oleopentraĵo.
- Vere ĉi tie mi ja povas mediti kaj vivi
vere poezie.

Kiel pli proksime al naturo vi estas !
Kiel pli multe naturo vin favoras !
(Nin, kiu daŭrigas labori de nokto ĝis nokto,
naturo forlasas, ne favoras.)

Oho !

Admirantoj de la kampara vivo,
ĉu vi certe ne pensas, ke homan stomakon
plenigas bildoj de naturo ?

Aŭ ĉu vi
estas niaj ekspluatantoj,
kiuj pri la mangado ne maltrankviligante
faras turismon aŭ promenas sur la kampo ?

Aŭ ĉu vi estas urbanoj
eltediĝantaj je la favoroj
de la materia civilizacio, de la urbana
civilizacio ?

Al ni, malsataj plugistoj,
la belo de la naturo estas ne inda je
eĉ unu bovleto da rizajo.

Niajn stomakojn ĝi ne plenigas.
Ĉu vi certe ne admiras
nian nunan staton mizeran ?

Admirantoj de la kampara vivo,
vi por ĉiam
admiru la kamparan vivon
kun blankaj manoj,
farante turismon aŭ promenante
sur la kampo.

Sed neniom vi forgesu la forton
de la ter-filoj dispremitaj,
kiuj malantaŭ vi
kreskas kun silento konsento,
kredante nunan tagon venontan
per la okuloj flamantaj.

SAT-BROŜURSERVO

SAT-Broŝurservo reeldonis...

* Komuna Kantareto (40-paĝa en A6-formato, 2FF)

Kdo LUPO en Laŭte n-ro 36 rimark(ig)is, ke oni ne plu kantas en niaj kongresoj. Efektive, eble emus kanti la maljunaj E-istoj, kiuj ja scipovas kanti kaj bone memoras la kanzonojn, kiujn oni kutimis kanti antaŭ kelkaj jaroj. Sed, ĝenerale, la gejunuloj ŝajne ne havas tiun emon, kvankam - ĉiam ĝenerale - ili estas saturitaj per la pli-malpli bonkvalitaj kanzonoj, kiujn supersate disŝutas iliaj radioriceviloj, kaj ĝenerale havas pli da nocioj pri muziko ol povis akiri la pliaĝuloj. Ankaŭ muzikludantoj estas pli multaj ĉe la gejunuloj, ol ĉe niaj pli aĝaj gekamaradoj.

Ĉe la broŝurservo de SAT, la fama "Komuna Kantareto" estis elĉerpita de pluraj jaroj. Mendo de la OKK de SAT-kongreso en Bazelo estigis la reeldonadon en pli oportuna A6-formato. Ĝi do nun estas denove disponebla kun proksimume la sama enhavo kiel antaŭe. Kompreneble, tiu KK ne enhavas la muziknotojn. Tio ja senutilas por la tre konataj kantoj, kiujn ĝi entenas. Estus vera hazardo, se en iu kantema grupo ne troviĝus almenaŭ unu persono kapabla "montri la vojon" al la ceteraj !
(20% da rabato por minimume 25-ekzemplera mendo).

* Esperanto in 24 pages (28-paĝa en A6-formato, 1 FF) Kodo: EA

Tiu broŝureto, kompilita de Brian McClafferty, celas angle-parolantojn. Ĝi entenas gramatikan resumon kaj 1000 radikojn.
(20% rabato por 10-ekzemplera mendo).

* Amo per Proverboj (24-paĝa en A6-formato, 1FF) Kodo: AP

Mallonga teatraĵeto de Arthur Azevedo, trad. de A. Couto Fernandes. Senpretenda, sprita komedio, en kiu la svatiganto fine atingas la celon - la vidvinon Agneso - persvade uzante amason da sukoplenaj proverboj. Tre taŭga por gajigi kluban kunvenon... lernigante ĝin al lernant(in)oj de konversacia kurso.

* El Verkoj de Lanti 1. (160 paĝoj, 15FF) Kodo : VL1

Jen finfine ree disponebla bela kolekto el elstaraj tekstoj de la fondinto de SAT :

- Adamaĵoj : artikoloj, kiuj aperis en Sennacieca Revuo kaj Sennaciulo de 1921 ĝis 1955, foje sub alia pseŭdonomo ol "Lanti".
- ekstraktoj el "Leteroj de Lanti", ordigitaj laŭ ĉeftemoj (Nia movado, Etiko, Klasbatalo, Naciismo-Internaciismo-Sennaciismo, respondoj al demandoj pri Sennaciismo).
- Absolutismo (parolado) kaj Herezaĵo (respondo al la malkontentaj legintoj de "Absolutismo").
- Herezulo : la gvidpunktoj de la bulteno, kiun efemere aperigis Lanti en 1935/36.
- Polemiko pri Sennaciismo kun kdo BOSK
- kaj fine, kvazaŭ konklude la artikolo "Mi ĝojas esti esperantisto".

VL1 kaj VL2 (vd. Laŭte n-ron 36) estas akireblaj aparte. La broŝurabonantoj aŭtomate ricevos aŭ jam ricevis VL2, sed ricevos VL1 nur se ili tion petos. Ĉar la tekstoj de VL1 jam estis eldonitaj de la broŝurservo, eble iuj broŝurabonantoj jam posedas ilin en pluraj nun elĉerpitaj kajeroj : AD, EL, AB, HH, aŭ VL.

Novaĵo en la franca lingvo !

* Notre Individualisme, ses revendications et ses thèses par questions et réponses, de E. Armand. (32 paĝoj, 1 ekz. 4FF - 20% rabato ekde 10-ekzemplera mendo).

Jen la originala, franca teksto de "Nia Individuismo" nun disponebla ĉe la broŝurservo !

Franclingvaj esperantistoj, kiuj iel rilatas kun liberecanoj, tiu broŝuro povas helpi vin, ĉar ĝi povas vekti la interesigon de liberecanaj neesperantistoj ! Ne nur ĉar ĝi estas en franca lingvo pri temo, kiu certe koncernas ilin, sed krome, ĉar ĝi informas samtempe pri la E-varbbroŝuroj disponeblaj ĉe "Cercle espérantiste de l'Agenais" kaj la nomoj de liberecanaj aŭtoroj jam tradukitaj kaj eldonitaj ĉe SAT-broŝurservo.

Ne hezitu do mendi ĝin !

Kribo.



INTERNACIA ĈENLETERO

POR PACO KAJ MALARMADO

Al ĉiuj virinoj en la mondo!

Malrapide ni, virinoj, vekigas.
Kio okazas ĉirkaŭ ni ?

Post la Dua Mondmilito 146 el 150 landoj membriĝis al la Unuiĝintaj Nacioj kaj devigis sin estonte vivi en paco kaj amikeco unu kun la alia. Dum la lastaj 30 jaroj entute okazis 6000 interparoloj por malarmado. Kaj kio estas la rezultato ?

Jam nun estas sufiĉe da atomarmiloj por detrui la mondon 40-oble. Kaj ankoraŭ ĉiam ne sufiĉas. Ĉiunminute registaroj elspezas du milionojn da guldenoj por armilaro. Dum ĉiujare milionoj da homoj mortas pro mizero. La politikistaj gvidistoj do ne sukcesis zorgi pri vivkapabla mondo. Sed virinoj apenaŭ aktivis en tio. Kaj virinoj konsistigas la duonon de la homaro. Leviĝu do ni, kune kun ĉiuj maltrankvilaj viroj, kaj diru ni, ke sufiĉas. Se sufiĉe da ordinara homoj en la tuta mondo agas tiel, tiam neniu registaro povas malatenti tion. Kaj estas nia plej lasta ŝanco por preventi mondkatastrofon. Tio ĉi estas ankaŭ la konkludo de la lasta raporto de U.N. pri la vetarmado.

Estas la intenco, ke tiu ĉi ĉenletero ekmarŝu en kiel eble plej da landoj en la Oriento, Okcidento kaj la Tria Mondo, pro la organizado de virin-pacmovadoj. Ni petas al vi kopii ĉi-suban tekston kaj sendi ĝin al : Mr. Kurt Waldheim, c/o United Nations, New York, 10017 New York, U.S.A.

* Al la Unuiĝintaj Nacioj,

*
* Mi faras al mi grandajn zorgojn pri la situacio en la
* mondo. Mi sentas min ne ŝirmata de ĉiuj tiuj atomarmiloj
* kaj aliaj armiloj. Fortimigo kelktempe povas preventi
* militon, sed ne realigi daŭran mondpacon. Mi opinias, ke
* ĉi-momente la vetarmado en si mem signifas la plej grandan
* danĝeron por la homaro. Mi deziras, ke ekde nun vi faru
* ĉion eblan por atingi inter la popoloj, tutmondan senarm-
* igon kaj pli justan dividon de la prospero.
*
*

subskribo(j)

Nacilingvan tradukon vi sendu al landa "Virinoj por paco"-movado, aŭ alia landa pacmovado aŭ al "Vrouwen voor Vrede", Nassaulaan 31, NL 9717 CG Groningen, Nederlando, kiu je U.N.-malarmadotago, je la 24a de oktobro 1981a prezentos ĉiujn leterojn al la registaroj ĉie en la mondo.

Vi bonvolu en malpli ol 10 tagoj post ricevo de tiu ĉi teksto multobligi ĝin 5-oble kaj transdoni ĝin al 5 aliaj virinoj. Tiu ĉi letero atingu ĉiun minimume unufoje. Homoj kiuj ne tuj volas kunlabori, eble tamen decidus fari tion, post pripensado de la afero dum iom da tempo.

Kelkaj adresoj de "VIRINOJ POR PACO" en diversaj landoj :

FRANCIO : Solange Fernex, F 68480 Biederthal.

DANLANDO : Kvinder for Fred, Dronningensgade 42
1420 København K, Danio.

BRITIO : Claire Ryle, Radiation and Health, Information Service, c/o Marion Close, Cambridge CB3 0HN

GERMANIO : Maria Gmelch, Hummelsteinerweg 79, 8500 Nürnberg

Inge de Bruin - Kooij

Rebato pri la raciisma religio (vd. pasintajn "Laŭte!")

Mi konscias, ke nomi raciismon religio estas absurde, sed tiu absurdaĵo estas reale ekzistinta kaj ekzistanta fakto. Dum la Franca Revolucio, oni kultis al la racio en la katedralo de Parizo, kaj nuntempe en Francio beboj estas civile baptataj en la kulto al la Racio. Mia artikolo estis ĉefe historia, kaj traktis ĝuste pri la absurdeco de religia konduto rilate al racio.

Jakelino.

Kontribuon de S. Sire pri la temo "La virina problemo" vi trovos sur paĝo 24.

* * * * *

* La venonta "Laŭte!" aperos meze de oktobro * * * * *

* * * * *

E-VIVO

Denove aperis "OBJECTIF 87"

Jam por la kvara fojo, SAT-Amikaro (67, avenue Gambetta, F 75020 PARIS) eldonis sian jaran francilingvan dokumenton "OBJECTIF 87 - esperanto" (celo 87). Per tio ĝi celas diskonigi kaj popularigi esperanton, precipe en progresemaĵoj, kaj tiel prepari la terenon al pli vasta informado fare de la amasinformiloj mem antaŭ la alveno de la jaro 1987.

En 8 paĝoj de formato 21x29,7 cm, ĝi prezentas amason da faktoj pri la "nova situacio de esperanto en la mondo", kaj tio estas fakte la titolo de la ĉefartikolo kaj ankaŭ de prelego, kiun prezentis profesoro Pierre Janton, de la universitato de Clermont-Ferrand, ĉe la Centro Pompidou, en Parizo, okaze de la Kultura Kunveno de SAT.

Alia grava artikolo estas pledo de profesoro G. Boulanger, prezidanto de la Internacia Kibernetika Asocio, kiun publikigis la belga gazeto "Le Soir". Aldoniĝas multaj citaĵoj de eminentuloj, inter kiuj S-ino Vigdis Finnbogadottir, prezidentino de la islanda respubliko, Franz Jonas, François Mitterrand, Bertalan Farkas, la unua esperantista kosmonaŭto, k.a.

Tiu ĉi dokumento estas ricevebla kontraŭ 3 internaciaj respondkuponoj aŭ egalvaloro.

Gazetara Servo
de SAT-Amikaro.

.....

Ni legis sur la aliĝilo de la kongreso de la Itala Esperanto-Federacio okazonta en Romo de la 19a ĝis la 24a de septembro 1981 :

"merkredon 23an, posttagmeze : L.K.K. organizas surstratajn manifestaciojn (rajtigitajn de la polico), al kiuj ĉiuj kongresanoj (italaj kaj eksterlandaj) estas varme petataj partopreni".

La italaj esperantistoj volas uzi novan (por esperanto) sistemon de propagando.

Komuniko de Aldo Formaggio.

En Sud-Okcidenta parto de Francio :

La venonta regiona renkontiĝo por la Zamenhofa tago okazos la 13an de decembro en la Junulara Domo de MONTAUBAN. Eblos alveni ekde la 12a posttagmeze kaj tranokti surloke.

Pli precizaj informoj aperos en la venontaj "Laŭte".

Nicole D.

La Esperanto-Semajno en Lot-Garonio

Kvankam la partoprenantoj estis malmultaj, mi tre ŝatis tiun E-semajnon en Bovilo (pli ĝuste en Laroque) : ĝi ebligis al mi pli ĝui la ĉeeston de ĉiu partoprenanto, des pli ke iuj ne alvenis samtempe, kaj simile foriris. Mi estis la lasta foririnto. Dank'al tio mi konas ĉiujn broŝurpresajn fakojn (faldado, kolektado, gluado, tranĉado), ĉar ni grandskale laboris sur tiu kampo dum tiu periodo.

Ni ankaŭ elektis la temojn de la venontaj ĉenleterdebatoj :

- * Kiel la E-instruantoj respondos al la antaŭvidata enkonduko de E en la lernprogramon ?
- * Maljuneco, maljuneco kaj esperanto.

Dum la sama periodo okazis renkontiĝo* en St Front. Vendredon 14an de aŭg. ni kunportis tien E-informilojn kaj librojn. Ni diskutis pri E en anarkiista medio kaj debatis pri diversaj sociaj temoj. Sabaton 15an de aŭg. en Libos denove ni ekspoziciis apud UPF- kaj anarkistaj tabloj. Al la jam konataj afiŝoj aldoniĝis ĵus kreita afiŝo desegnita de Janseb kaj Beatrica. Malmultaj minutoj sufiĉis al ili por ĝin desegni. Preskaŭ ĉiuj ĉeestintoj estis esperantistoj, do nur unu persono aĉetis lernmaterialon. En Libos kelkaj scivolemaj homoj venis ĉe la budo, sed ne sufiĉe interesiĝis por aĉeti librojn. Tiuj kvazaŭaj ekskursoj ebligis al mi ekkoni la regionon.

Suzana.

*temis pri liberecana renkontiĝo daŭranta tutan semajnon.

Aĝenia E-Rondo : Pro tro-malmulteco de la AERA-anoj la 9an de aŭgusto, ne povis okazi diskutado pri grupaferoj. Ŝajnas tamen necesa minimuma interana rilatado, ekzemple unu fojon ĉiun trian monaton. Venonta "rendevuo" : sabate 19an kaj dimanĉe 20an de septembro, okaze de la

renkontiĝo de geesperantistoj de MONTAUBAN kaj Girondio en "Moulin de Carguessac", 47470 BEAUVILLE.* (Unue sin anonci skribe aŭ telefone al C.Baudé en Laroque Timbaut. Dankon!)

.....

JUBILEO René LLECH-WALTER : Eks-estrarano de UEA, prezidinto de UEF, prezidanto de la Federacio "Langvedoko-Rusiljono" kaj de la Kultura Centro en Perpignan, Prezidanto de la Politeknika Asocio, René LLECH-WALTER atingis, en 1981, 75 jarojn kaj dum 60 jaroj propagandis, prelegis kaj gvidis kursojn. Li ĵus organizis la 73an francan kongreson de Esperanto en Perpignan kaj ricevis, je tiu okazo, multajn gratulojn kaj bondezirojn.

K.E.C.
Perpignan.

.....

Korespondi deziras : Tadeusz Marasek, str. Monte Cassino 11 m 144, PL - 01-121 VARSOVIO, Pollando. "Mi estas 15jara knabo, liceano en ekonomikista lernejo, membro de Kastora Klubo. Mi kolektas poŝtmarkojn, bildkartojn, insignojn, prospektojn, fotojn de geaktoroj kaj gekantistoj, kasedojnkun muziko el aliaj landoj (moderna, malnova, folkloro, klasika, rock-and-roll, svingo, bluso, ktp). En viaj leteroj vi povos priskribi vian landon, urbon, ĝian historion, legendojn, kutimojn, ktp..."

Korespondi deziras : Vasilij GRIGORENKO, Krasina-str.95, 1 oĝ.16, POLTAVA-28, Ukraina SSR, SU-314028. "Mi volus korespondi pri diversaj temoj. Mi kolektas E-aĵojn kaj bildkartojn kun vidindaĵoj de urboj..."

.....

La Esperanto-grupo Girondia kunvenos la 26an de Septembro je la 15a horo en EYSINES. Por pli precizaj informoj pri la kunvenejo telefoni al (16-56)-08 50 12 post la 19H ĝis la 21H.

----- Moulin de Carguessac, 19/20 Sept. -----

* La kunveno komenciĝos sabaton 19an de septembro, je la 16a. Eblos tendumi surloke. Kiuj ne posedas tendon, tiuj povos tamen tranokti interne de la muelejo. Kunporti nur dormosakon. Ĉiuj estos bonvenaj !
AERA-anoj, kiuj ne povos tranokti en "Carguessac" aŭ ne povos "liberiĝi" sabaton posttagmeze : la grupaferojn ni pridiskutos dimanĉon posttagmeze.

NIA FELIETONO

TRA LA MONDO

per biciklo
kaj esperanto (Alfa-Beta)

Vladivostoko, la 23an de julio 1930.

Klopodoj, ĉiam klopodoj, ankoraŭ klopodoj ! Ĉi-rilate Sovetio rompas rekordojn ! Kaj kiu rezulto ? Por atendi japanan ŝipon, kiu, sen formalajo, kondukos min al Japanio. Guste el tio fontas la malfacilaĵoj - kvankam mi posedas sufiĉe gravan ŝparitan sumon el rubloj, mi vere nenion povas fari per ĝi sur la internacia kampo. Tie ĉi oni malpermesas al mi ilin eksporti, kaj tie oni neniel volas ilin akcepti. Jen sorĉa rondo, dram-komedia, kiu naskas senfinajn diskutadojn kaj klopodadojn.

Fine, mi sukcesis pagi mian ŝipveturadon ĝis Japanio, sed mi alvenos tute senmona, lasante depone en la poŝta ŝparkaso de Vladivostoko mian tutan ŝparmonon.


La 28an de julio 1930, sur la japana ŝipo Toju-Marŭ, inter Vladivostoko kaj Tsuruga.

Je la 7a, ekiro al la enŝipiga kajo. Hodiaŭ estas neniu malfacilaĵo por eniri sur la kajon. De kelkaj tagoj, ĉiuj enŝipigaj formalajoj estas plenumitaj kaj mia bileto estas pagita ĉe la japana agentejo. Tial tuj la japana komandanto montras al mi la kajuton, kien mi povas transporti miajn pakojn. Baldaŭ alvenas la japanaj respondeculoj de l'ŝipo.

Kompreneble, kamaradoj Skiba kaj Zuj akompanas min, kaj, atendante la ekiron, konsole kuraĝigas min per sia frateca ĉeestado. (Mi memoras, ke, kiam mi ekiris el Liono, estis nur mokaj ridetoj !) Sincera emocio eklarmigas min. Unuafoje en mia vivo mi forlasas la kontinenton - nu jes, Vladivostoko estis tamen ankoraŭ peco de Francio por mi. La aventuro nun havos nekutiman vojon. Ankoraŭ dek minutoj kaj mi vidos la adiaŭojn de miaj amikoj - ja de miaj fratoj - kaj jen ĉiu kontakto malaperos...

Adiaŭ, miaj amikoj, adiaŭ angordona sed kiel loga Sovetio ! Mi restas sola kun miaj pensoj, miaj memoraĵoj, miaj esperoj. Feliĉe, la mirinda pejzaĝo, kiu elvolviĝas sub miaj okuloj, alportas al mi avantaĝan deturnigan distrilon.

La vetero estas belega, la maro kvieta, kun suda brizo.



La suno brilegas. Ni forlasas la marbordon maldekstre. Iom post iom malaperas la tero, Vladivostoko jam tute ne plu videblas. Plifortiĝas la zumado, ni estas en marmezo. Jam ni traveturas aron da fiŝoj, dikaj kiel bovoj, kiuj nin sekvas dum preskaŭ la tuta irado : estas focenoj, mi kredas. Mi agrable min distras, vidante ilin petoli ĉirkaŭ la ŝipo. Mi revadas, admirante tiun por mi novan naturan mirindaĵon : la Oceanon.

La unua manĝo kaj homa kontakto kun la japanoj estas senafekta. Kiam mi eniras, kelkaj viroj jam estas manĝantaj pladojn nekonatajn de mi. Ĝentilajn salutojn, riverencojn, kaj tute simple ili sidigas min apud si. Mia manĝilaro estas laŭ la eŭropa maniero. Ili manĝas per bastonetoj. Oni provis fari specon de blanka bulketo nur por mi. Kiel deserto, dika pomo. Estis la plej agrabla momento de la manĝo, ĉar de mia foriro de Francio mi preskaŭ ne estis gustuminta fruktojn.

Mi apenaŭ sukcesas komprenigi min per gestoj. Oni montras al mi ilustraĵojn kun esperantaj tradukoj. Tio estas la unua rivelado de la dinamismo de la lingvo internacia (nekonata afero en Francio, eĉ en 1966). En Japanio la dinastio mem akcelas esperanton por kontraŭstari la prestiĝon de la angla. Konsekvence, la papero envolvinta la tualetsapon havas reklaman tekston en esperanto, kiu finiĝas jene : "dezirindas, ke MIA SAPO fariĝu monda necesajo, same kiel Esperanto pli kaj pli sin trapuŝas kiel internacia lingvo".

La 30an de julio, je la 10a, Toju-Maru atingas havenon MANAO. Mi estas en Japanio. La ŝipestro vizitigas al mi la urbon. Oni sin kredus en vaska urbeto : mallarĝaj stratoj (en Sovetio la plej mallarĝa strato de vilaĝo estas almenaŭ 20-metra), zorge gudritaj, puraj, kun etaj ĉinaj butikoj ĉe la rando...laŭ la japana maniero, t.e. kun mine-scias-kion, kiu klare diferencigas ilin disde la ĉinaj. La homoj estas vestitaj per ampleksaj bluzoj kun larĝaj manikoj nomataj KIMONOJ. Ĉiuj estas ŝuitaj per pantofloj, ZOLI, kies plandumo estas aŭ ligna aŭ kaŭĉuka. Ili estas fiksitaj ĉe la piedoj per la dika fingro. Sub la ligna plandumo de la virinaj ZOLI estas du 4-5-centimetraj lame-noj ankaŭ el ligno, kiuj klakas sur la bitumo. En tiuj ŝuoj ĉiuj estas senŝtrumpaj, de la plej malriĉa ĝis la plej

riĉa, ĉar por oniri en domon (krom en iujn grandajn magazenojn) oni devigo demetas siajn ŝuojn.

Ĉi tie neniu almozulo.

La 3an de aŭgusto 1930 mi malfermas la 18an Nacian Kongreson de Esperanto en KAZANAVA. Poste mi faras diversajn vizitojn : al la "Japana Bretonio", al leprulejo la 23an de aŭgusto. Vespere, post la kongreso, du kamaradoj min kondukis al la "rezervita kvartalo", kie mi travivis neforgeseblan sperton. En Japanio prostituado tiam estis laŭleĝa...

Por komenci ni iras en kafejon, kie tri junaj sinjorinoj sidigas apud ni. Baldaŭ, seninvite, ili sidas sur niaj genuoj. Ili estas "logistinoj", al kiuj oni tamen ne povas peti, ke ili sin prostituu, laŭdire. Baldaŭ 5-6 bierboteloj kuŝas surtable. Tio necesas - ili klarigas - por aŭdaci sin konduki "pli foren" en la rezervita kvartalo. Mi lasas min tien kuntreni, ĉefe pro raporta motivo. Mi trinkas nur modere, kaj neniam perdos mian memregon. Ĝis noktomeze ni vizitas 5 aŭ 6 logdomojn. En unu ni renkontas du aliajn kongresanojn jam duonebriaĵn. Tia estas la homa gento...

Jen mi estas en la rezervita kvartalo. Ni alvenas en stratetojn malbone lumigitajn. Viroj, virinoj kaj infanoj cirkulas procesie sur la trotuaroj. Virinoj estas ekspoziciataj en montrofenestroj kaj la amaso gapas ilin, kiel je novjaraj vitrinoj. La plimultaj estas ankoraŭ tre junaj : 15-16jaraj proksimume.

Malgraŭ la mallarĝaj stratoj la kvartalo estas iel respektinda. Ankaŭ tie neniu almozulo. Ĉio estas pura : neniu papero aŭ rubo, polvo kaj koto. Sed pasas la tempo, ni devas elekti. Do mi "plukas" 19-jaran junulinon proksimume, kiu ŝajnas iom malpli impertinenta ol siaj koleginoj. Miaj amikoj diskutas la prezon de nia gastado. Ĉio okazas sen bruo, honeste. Kiam difinita la merkato, mia kunulino afable min sekvas kun tuko pura, parfumita, kiun ŝi prenis ĉe sia "mastro".

Ni estas kondukitaj al banejo, kie tri bonmanieraj servistinoj nin frostas, sapumas, poluras kaj parfumas de verto ĝis plandoj. Ĉe la unua etaĝo oni prezentas al ni verajn pupojn, bone ŝminkitajn, purajn kiel juveloj. Poste oni pretigas liton por ĉiu kaj fermas niajn ĉelojn per tiom praktikaj glitvandoj. (daŭrigota)